


La Krokodil'



Informbulteno de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo
1 rue Jean Aillet, 31000 Toulouse
tel/fax 05 61 25 55 77; courriel toulouse@esperanto.org
Januaro 2003

Nova jaro atendas nin

La unua trimestro de ĉi tiu jaro estas enhance riĉa por nia loka esperanto-movado: ni prezentiĝis al la publiko per stando kaj prelego, kursoj pluas, nia teatra trupo sin prezentis dufoje (en Bordojo kaj en Tuluzo), ni digne festis la Zamenhof-tagon, kaj nia ĝenerala asembleo decidis pliampleksigi la gvid-teamon.

Ni devas daŭrigi la laboron por konigi la internacian lingvon, ankoraŭ kaŝita aŭ ignorata de tro multaj, ĉefe de junuloj.

Tial, estas dezirinde ke multaj levu sian lingvan nivelon kaj ekzameniĝu, por poste instrui la lingvon en lernejoj kaj universitatoj.

Tia estas la privilegiota vojo.

Mi sendas al vi ĉiuj sezonajn bondezirojn, kaj krom sanon, deziras bonan esperantumon.

– Jeannette CASH

Un Russe à Toulouse / Ruso Mikaelo Bronŝtein

Mikaelo BRONŜTEIN prezentos al ni:

- **Dimanĉon la 19an de jan.**, je la 17a

en la **fervojisto-salono** (9 rue Marengo) prelegeton pri esperanto-movado en Rusio kaj de Peterburgo. Li respondos ĉiujn niajn demandojn, ankaŭ pri politika kaj socia situacio en la lando, kaj kantos siajn kanzonojn en esperanto. Li prezentos ankaŭ sian novan diskon. Ne maltrafu okazon rekte paroli kun vera Ruso!

- **Lundon la 20an de jan.**, je la 21a, antaŭ neesperantista publiko, kanzonojn en la rusa kaj en esperanto; prelegos en la rusa pri la 300a datreveno de Peterburgo, kaj respondos demandojn de la publiko en abau lingvoj (traduko al la franca estos provizita).

Tiu vespero okazos en la **Festsalono de Tournefeuille**, rue Panouse, estas kunorganizita de *Solnitchko*, franc-rusa kultura asocio.

Mikaelo naskiĝis en sudokcidenta Ukraino, en urbo Ĥmelnickij. Simile al Zamenhof, li estis ĉirkauŝita de almenaŭ kvar etnoj: judoj, rusoj, ukrainanoj, kaj poloj. Do, li kaj liaj diversgentaj amikoj ekde infanaĝo parolis kvar lingvojn. Eble ankaŭ pro tio li eklernis esperanton en 12-jara aĝo. Li finis mezlernejon en la naskiĝurbo, kaj daŭrigis studadon en Rusio, en la antikva urbo Tula (200 km sude de Moskvo). Li studis elektron kaj ricevis diplomon kiel inĝeniero pri elektro. Samtempe li studis ĵurnalistan metion kaj kunlaboris en diversaj ĵurnaloj kiel raportisto, ankaŭ per siaj ruslingvaj poemoj. Li ricevis diplomon ankaŭ pri ĵurnalista fako. Post finstudo li iris al urbo Tihvin (200 km oriente de Sankt-

Peterburgo) por labori kiel inĝeniero pri elektro. Li loĝas en Tiĥvin ĝis nun, sed en 1981-1990 li restis en Vorkuta, urbo trans polusa cirklo, kie li laboris en karbminejo kiel ĉeffakulo pri elektro. Post reveno el Nordo al Tiĥvin li havis oficon de direktoro de la fabriko pri plastaj varoj. Nuntempe li estas dungita direktoro de malgranda firmao pri lignaĵproduktado. Li havas edzinon kaj lia sola filo finstudis juron en universitato kaj oficas en Sankt-Peterburgo. Krom la ofico, li pli-malpli profesie okupiĝas pri esperanto. Dum multaj jaroj li instruas la lingvon. Li verkas poemojn, kantojn, prozaĵojn, kaj tradukas. Ekde 1992 ĝis nun aperis 12 liaj libroj: 5 originalaj kaj 7 tradukitaj. En la eldonejo "Impeto" (Moskvo) kuŝas pliaj du.

Des nouvelles de notre association EKC

Cours

Le cours du 2^e degré fonctionne avec 7 élèves très motivés.

Une nouvelle formule le « Cours express » a commencé le 25 novembre avec 3 élèves ; il se terminera le 6 janvier, et une nouvelle session pourra débiter le 13 ou le 27 janvier, si cette formule rapide fait des adeptes.

Quartier Ancely

Une présentation de l'espéranto a été faite à la MJC-Ancely par les membres du groupe local, avec visionnement de la cassette du Congrès Mondial de Montpellier. 3 personnes, visiblement très intéressées par notre langue, vont se mettre à l'étudier.

Le groupe théâtre

Le TTT, qui s'est produit avec le succès que l'on sait à Bordeaux et à Toulouse, est engagé pour une représentation à Collonge-la-Rouge au Congrès des Cheminots et à Cap d'Agde pour le Congrès de SAT-Amikaro (w.e. de Pâques).

Esperanto-Magazino de Tuluzo

L'Esperanto-Magazino est diffusé le mardi de 14h à 16h sur 89,1 MHz de Radio FMR. C'est la rediffusion de l'émission réalisée par Kristina et Flo en direct sur Canal Sud le lundi soir de 20h à 21h sur la fréquence 92,2 MHz.

Bien sûr ne pas oublier aussi l'émission en direct *Esperanto Magazino de Tuluzo* réalisée par Rikardo, Julien, et Flo sur les ondes de Radio Occitania 98,3 MHz tous les jeudis de 19h à 20h.

Esperanto Magazino, c'est de la musique en espéranto, des infos internationales sur la vie de l'espéranto, des dossiers sur le problème des langues, des infos locales, un cours express d'initiation à l'espéranto, des invités des associations d'espéranto ou d'espérantophones de passage, et encore de la musique!

Donc, pas d'histoires, vous êtes avertis!

Et si vous loupez *l'Esperanto-Magazino*, c'est que vous le faites exprès, et vous n'aurez pas d'excuses!

La rédaction d'Esperanto-Magazino : Kristina, Rikardo, Julien, et Floréal.

Bibliothèque du Quartier Rangueil

Les 12 panneaux de notre exposition sur l'espéranto et plusieurs vitrines de livres modernes en espéranto ont été présentés pendant la dernière semaine de septembre 2002 dans cette biblio-

thèque. Des photos son reproduite, en page 8, afin de donner des idées à d'autres. (Cette expo peut être mise gratuitement à votre disposition.)

Ekzamenoj en Tuluzo

Unuagrada ekzameno:

sabaton 25an de januaro 2003 (organizita de TEF).
Enskribiĝo eblas ĝis la fino de la jaro (Josée Lafosse 05 61 24 14 45).

Duagrada ekzameno:

planata ĉe la fino de junio aŭ en septembro.

Kaj niaj manĝo-klaĉoj:

Vendredon la 10an de januaro: okazos la venonta. Ni parolu pri niaj ferio-projektoj, kiu iros kien..., en Esperantujo aŭ ne.

Vendredon la 7an de februaro: Temo : la Mondaj Socialaj Forumoj. Jean-René kaj Hélène FULNEL venos por rakonti la Socialan Forumon , kiun ili ĉeestis en Florenco (se la dato konvenas por ili).

Des nouvelles d'« Esperantujo » / Novaĵoj el Esperantujo

Le film

La Tukoj (10 mn.), basé sur un scénario écrit par un atelier d'écriture sous la direction d'Arno Lagrange, et réalisé par Céline Bernard en collaboration avec notre Centre Culturel, a reçu le premier prix dans la catégorie film artistique au Festival de Maribor (Slovénie), le 9 novembre.

En projet : une version un peu plus longue, sous-titrée en français (et pourquoi pas en occitan ?).

Forum Social de Florence

Deux espérantistes de Toulouse et un autre de Lourdes étaient présents au Forum Social de Florence, en novembre dernier, et y ont représenté avec d'autres l'espéranto. Le prochain Forum, qui aura lieu à Porto Alegre à partir du 23 janvier prochain se saisira peut-être du problème de la démocratie linguistique dans le monde : un texte fort intéressant et extrêmement documenté rédigé par Monsieur Alain Lauffenburger, universitaire français enseignant au Japon, y sera présenté.

Kie okazos kio?

Kiel trovi Esperanto-renkontiĝojn en najbaraj aŭ en iuj specifaj landoj? La listoj laŭ datoj ofte ne multe helpas tiurilate. De kelkaj semajnoj la demando estas pli facile respondebla – EsperantoLand kreis en interreto renkontiĝajn mapojn sur kiuj estas indikitaj la lokoj de estontaj Esperanto-renkontiĝoj.

Ĉe www.EsperantoLand.org/renkontighoj. Informo de Lu Wunsch-Rolshoven (EsperantoLand)

Novaĵoj de nia ĝemel-urbo Atlanta

Tuluzo estas « ĝemelita » kun pluraj urboj. Unu el ili estas Atlanta, en Usono. Tial ŝajnis al ni interese sciigi al tuluzaj esperantistoj ĉi tiun novaĵon.

Joel AMIS (joelamis@yahoo.com), kiel reprezentanto de la Esperanto-Societo de Atlanta (plej granda urbo de la usona ŝtato Georgio), ricevis oficialan salutleteron de la Ŝtatestro de Georgio honore al Zamenhoftago. En lia letero al ELNA li skribas:

“Mi scivolas ĉu tia afero iam okazis antaŭe? Mi ja scias ke urbestroj sufiĉe ofte donas proklamaĵojn kaj aliajn ceremoniajn dokumentojn por Internacia Amikeca Semajno, Zamenhoftago k.a. Sed mi ankoraŭ ne aŭdis ke ŝtatestro donis ceremonian dokumenton por esperanta afero. Do koncize mi deziras demandi: 1) ĉu ŝtatestro iam donis ceremonian dokumenton por esperanta afero? – aŭ, pli specife, 2) ĉu ŝtatestro iam donis ceremonian dokumenton por Zamenhoftago?”

(Inf: Donald J. HARLOW, (donh@donh.best.vwh.net).

Ŝtato Georgio, Oficejo de la Ŝtatestro, Atlanta 30334-0900

Roy E. Barnes, ŝtatestro, 15an de decembro, 2002

“Saluton,

Estas plezuro proponi varmajn salutojn kaj bonvolojn okaze de la festo de Zamenhof-Tago, de la 115-jara jubileo de la lingvo esperanto, kaj de la kvina datreveno de la fondo de la Esperanto-Societo de Urbego Atlanta (ESMA).

La lingvo esperanto kreiĝis en 1887 pro bezono de la plurkultura loĝantaro esprimi sin per unu komuna lingvo. ESMA estas asocio de esperantistoj de la regiono de la urbego Atlanta kaj tra Georgio. Celante instigi komunikadon pere de esperanto, la Asocio okazigas kursojn kaj konversacigrupojn, partoprenis multenombrajn festivalojn kaj interkulturajn okazaĵojn, kaj gastigis nacian Esperanto-Kongreson en Atlanta. Mi laŭdas la membraron pro antaŭenigado de la celoj de la Asocio.

Plej bonajn dezirojn por memorinda festo kaj daŭra sukceso de ESMA.

Sincere,

Roy E. Barnes”

Compte-Rendu de l'AG

AG statutaire du 8 novembre 2002 (compte-rendu résumé)

Après son assemblée générale statutaire, le Centre Culturel continue son activité, avec la même équipe un peu étoffée.

1. **Daniel Maynau est élu président de séance**, et J. Caubel secrétaire (aidé de J.M. Cash).

2. **On distribue le rapport moral** (1 page) et le rapport d'activité (3 pages). L'association a 40 membres, contre 36 en 2000/2001 ; elle fait partie de la Fédération Espéranto-Midi-Pyrénées et du Centre Toulousain du Volontariat. Trois domaines d'activités : information, enseignement, culture.

3. **Discussion** : on remarque que les conférenciers étrangers n'ont parlé que devant un public espérantophone. Il faudrait changer cette année, organiser une séance publique pour Mikael Bronstein (J.M. Leclercq a une proposition, voir ci-dessous).

La tournée de conférences des Robineau en octobre 2001, bien qu'elle n'ait pas attiré grand-monde à la MJC Ancely (30 personnes), a eu du succès à Castanet et à Lavaur : grâce à elle un cours débute maintenant à Lavaur.

On aborde la difficulté à faire connaître nos activités.

Vote : rapport adopté à l'unanimité moins une abstention.

4. Présentation du rapport financier : un déficit de 688 FR (=105 €) et 12.042 FR (soit 1.835 €) de trésorerie.

5. Discussion : On remarque que la librairie a plus vendu que l'an d'avant.

Les subventions représentent presque un tiers des recettes cette année. (En réalité 22 %, si on ne tient pas compte de la subv. CNASEA.) Les subventions de fonctionnement du Conseil Général et de la Mairie amènent près de 1.000 € ; La Jeunesse et les Sports a soutenu un projet particulier (Année des Langues) pour 381 €. Vote du rapport financier : adopté à l'unanimité.

6. Remplacement des membres du CA sortants :

Le CA est composé de C. Haïoun, J.M. Cash (en fin de mandat, qui se représentent), V. Fourcassié, D. Maynau, et C. Vidotto (élus l'année dernière pour deux ans).

C. Vidotto ayant exprimé son manque de disponibilité, J.M. Cash insiste pour que d'autres personnes se présentent afin d'étoffer un peu l'équipe.

V. Fourcassié explique qu'il n'est pas nécessaire de disposer de beaucoup de temps, puisque la plupart des consultations se font par l'internet, et qu'il est important de disposer d'un certain nombre de personnes compétentes pour donner des avis avant les décisions.

Après discussion, acceptent d'être candidats F. Martorell (pour les questions artistiques/musique), J.M. Leclercq (pour les langues régionales et de l'Europe de l'Est), A. Lagrange (questions artistiques/théâtre), et Annie Ducroix (affaires scolaires), en plus de C. Haïoun et J.M. Cash. On vote pour l'équipe entière : élue à l'unanimité avec une abstention.

Le conseil ainsi élu choisit immédiatement en son sein le bureau :

Élus président : D. Maynau, Vice-présidente : C. Haïoun, Secrétaire : J.M. Cash, Trésorier : V. Fourcassié

7. Fixation de la cotisation : D. Maynau propose d'instaurer une cotisation réduite pour les étudiants et chômeurs. On adopte à l'unanimité (avec une abstention) les taux de 16 et 8 €.

8. Sous la rubrique « questions diverses », ont été abordés les différentes actions et activités de l'année en cours.

a) La tenue du stand dans la cour de la Cinémathèque, lors de « Peuples et Musiques au Cinéma », du 14 au 17 novembre.

b) On discute de la façon d'aborder l'information dans les lycées, les démarches faites par la secrétaire n'ayant jusqu'ici pas porté de fruit. Le projet de voyage autour du monde d'un jeune couple pourrait également être utilisé, avec leur accord (par ex. suivi par les élèves des aventures vécues en espéranto dans différents pays).

c) La venue de Mikael Bronstein du 19 au 21 janvier : J.M. Leclercq propose de faire deux séances, une uniquement en espéranto, et l'autre grand public, organisée avec une association culturelle franco-russe de Tournefeuille. J.M.L. va contacter cette association. Jeannette va demander la salle des cheminots près de la gare pour la réunion du 19 entre espérantistes.

d) Les esp-istes ayant participé au Congrès Catalan ont annoncé que les Catalans auraient abandonné le projet d'organiser un Festival KAFE en 2004.

e) A. Lagrange va faire un voyage au Sénégal le 29/11 et emportera quelques livres et revues destinées aux espérantistes locaux qu'il a contactés. Une collecte est organisée et une corbeille circule pour recueillir les dons. Des doubles de la bibliothèque pourront aussi être donnés.

La réunion s'est terminée vers 20h.30 et a laissé place au repas convivial, auquel ont participé 14 personnes.

Zamenhof-festo

En collaboration avec le TEF (Tuluzaj Esperantaj Fervojistoj), Espéranto Midi-Pyrénées, et EUROKKA, la Fête de Zamenhof a été célébrée le 14 décembre en présence d'une cinquantaine d'espérantistes et quelques sympathisants.

Zamenhof-festo en Tuluzo : raportas J. Caubel

La 14an de decembro kuniĝis kvindek esperantanoj okaze de la tradicia naskiĝfesto de la iniciatinto de esperanto. Post komuna tagmanĝo apud glaciglitejo, ni spektis valoran teatran kaj muzikan prezentaĵojn.

Alvenis gesamideanoj eĉ de malproksime, ekz. de Cahors, de Pau, de Perpignan. Montpellierano Thierry Saladin rapide montris glurubandojn por reklami esperanton, lingvon eŭropan. Li vendas ilin por glui sur vian veturilon.

Post komuna restoracia manĝo, ni iris apuden al la haloj de « Comité d'Entreprise » de la Fervojistoj. La organizintaj asocioj (EKC, Fervojistoj, Regiona Federacio, kaj EUROKKA) prezentis librojn kaj diskojn.

La posttagmeza spektaklo konsistis el teatraĵo kaj kantoj kun gitar-akompano. Pasintjare kreis Arno Lagrange Teatran Trupon en Tuluzo (TTT). La aktoroj ne estas profesiaj kaj ne perfekte regas esperanton, sed kuraĝas tiel plu lerni ĝin. Ili jam ludas sian duan teatraĵon! Kaj kun sukceso; ili bone gestas, ĝuste akcentas la vortojn. Tiun ĉi verkon de Labiche prezentos la trupo en Cap d'Agde la 22an de aprilo 2003, dum la SAT-Amikara jara kongreso.

Poste kantis Thierry FAVERIAL kun propra gitar-akompano. Li prezentis tre diversajn kanzonojn, amkantojn kaj aliajn, de li mem aŭ de francaj poetoj, ekz. Jean Richepin; ankaŭ alilandajn kantojn. Ĉiujn kanton prezentis unue Brigitte Faverial. Tamen ne ĉiuj spektantoj komprenis la tekstojn, des pli ke kelkaj ne estis esperantistoj.

Je la sesa horo disiris la pli ol kvindek partoprenintoj, post tiu ĉi agrabla festo kaj bonkvalita kultura parto.

Alvenis dankesprima mesaĝo de la **Tarba esperanto-grupo**, kiu diras sian kontenton pro la okazinta Zam-festo.

Ili ankau sugestas diversajn aliajn vojojn por regionaj tiaj renkontiĝoj:

- kiel pli partoprenigi la ĉeestantojn?
- kiel internaciigi la renkonton? – ekz. invitante hispanojn.
- Ĉu ne plilongigi la daŭron de la kunveno? – semajnfino?
- Kial ne elekti daton en la somero?

Tiuj lastaj rimarkoj igas min pensi, ke eble esperantistoj de nia regiono dezirus pli longan kaj internacian renkontiĝon, kio ja tre similas al regiona kongreso! Ja delonge ne plu okazas kongresoj en Midi-Pyrénées, ĉefe pro manko de "batalantoj"; ĉu jam alvenis la tempo? Ĉiuj esperantistoj tion pripensu, same kiel nia asocio pripensos.

D'autres actions

26 deputitoj en Midi-Pyrénées

Ĉiuj deputitoj de nia regiono ricevis leteron de la prezidanto de federacio Espéranto-Midi-Pyrénées pri oficialigo de esperanto ĉe Bakalaŭro kaj aliaj ekzamenoj.

Ĝis nun nur tri respondis, el kiuj du favore, skribas ke ili pridemandis la Ministron Luc Ferry.

La proporcio de pozitivaj respondoj estas la sama en la aliaj regionoj de Francio kie okazis la kampanjo (Norda, Pariza, kaj unu alia regionoj). Do entute deputitoj ekdemandis tiuteme la Ministron pri Edukado.

Kvankam modesta, tiu rezulto certe helpos la traktadojn de Claude Longue-Épée, respondeculo pri Eksteraj Rilatoj de UFE ĉe la ministerio.

Correspondance avec Monsieur Jean DIEBOLD, député

Dans le cadre de la campagne auprès des nouveaux députés élus en juin dernier, nous avons échangé de la correspondance avec Monsieur Jean DIEBOLD, député de Toulouse et Adjoint au Maire. M. Diebold avait répondu tout-à-fait favorablement à notre demande, en ces termes :

« J'ai bien reçu votre courrier en date du 29 oct. dernier par lequel vous sollicitez l'officialisation de l'espéranto comme matière à option des examens et des programmes scolaires. J'interviens immédiatement auprès de Monsieur Luc FERRY Ministre de l'Education Nationale. »

Quelques semaines plus tard, M. Diebold nous a fait part de la réponse reçue du Ministre. Cette réponse, relativement longue (2 pages), est une fin de non recevoir par rapport à la question abordée, et se termine par ces mots :

« En revanche, rien ne s'oppose à ce que des établissements scolaires, à leur initiative et sur leurs moyens propres, organisent, dans le cadre d'activités complémentaires, une initiation à l'Espéranto pour des élèves volontaires. »

Internacia Kalendaro

14-18. aprilo

[Inicado kaj praktiko de joko](#) kun Arlette Plutniak kaj samtempe Katalin Smideliusz en Bourese. Inf: Kvinpetalo, Esperanto-Centro, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel/fakso: +33-(0)549428074, rete: kvinpetalo@club-internet.fr

14-21. aprilo

[18-a Printempa Semajno Internacia \(PSI\)](#) en Bonn. Inf: Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr - Ahrweiler, Germanio. Tel: +49-(0)2641-4885, fakso: +49-(0)2641-978666. Rete: psi@esperanto.de

16-22. aprilo

[Internacia Junulara Festivalo](#), IJF. Inf: ijf.admin@esperanto.it

18-21. aprilo

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio Kongreso en Christchurch. Inf: Sekretario de la LKK, David Dewar, rete: gdewar@ihug.co.nz

19. aprilo

Jarrenkontiĝo - konferenco de ESO en Bratislava. Inf: Esperanto Societo (ESO), Alica Komlošiova, Rovníková 6, SK-821 02 Bratislava, Slovakio, Tel.: +451-02-43291604, rete:

19-21. aprilo

58-a Kongreso de SAT-Amikaro en Cap d'Agde. Inf: SAT-Amikaro, 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris, Francio. Tel: +33-(0)147978705, fakso: +33-(0)1.47.97.71.90. Rete: satesper@noos.fr

26. aprilo - 03. majo

[Tutsemajna Verkad-Staĝo](#) kun Istvan Nemere kaj Anna Lowenstein, Grésillon. Inf: Chateau, FR-49150 Baugé, Francio. Tel: +33-2-41891034. Rete: esperanto.en.vendomois@mail.dotcom.fr

29. aprilo - 03. majo

kvinpetalo@club-internet.fr

Voici les photos de l'exposition à la bibliothèque de Ranguel.

Akceptu niajn plej elkorajn bondezirojn por la jaro 2003